

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1968

Wichtiger Wechsel in Frankfurt (M)

Mit ruhigem Gewissen kann man behaupten, daß der Name Carl Johannes Rummel seit dem Bestehen der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten in diesem Kreis einen guten Klang hat. C. J. Rummel hat unseren Landesverband sozusagen mit aus der Taufe gehoben, damals im Jahre 1950, als der Hauptvorstand des BSW beim internationalen Verband in Amsterdam die Aufnahme von zunächst 60 deutschen Mitgliedern beantragte.

In den folgenden Jahren hat C. J. Rummel bei vielen Entscheidungen mitgewirkt, die von dem damaligen Beratenden Fachausschuß, dem heutigen Arbeitsausschuß, getroffen wurden. C. J. Rummel wurde seinerzeit GEFA-Mitglied und fand als älter Lateiner großen Gefallen daran, sich in die grammatischen Feinheiten zu vertiefen und die Möglichkeiten der Syntax nach allen Richtungen zu durchforschen. So brachte er es im Selbststudium zuwege, in den Kongressen kleine Ansprachen zu halten und in seiner burschikosen Art mit ausländischen Kollegen in der Internationalen Sprache zu plaudern.

C. J. Rummel hat seinen Arbeitsplatz als Sachbearbeiter für kulturelle Angelegenheiten beim Hauptvorstand des BSW geräumt.



C. J. Rummel



Kurt Mäntele

Am 8. September 1968 vollendete er das 65. Lebensjahr, zu welchem Anlaß der GEFA-Vorstand ihm einen Chrysantemenstrauß über-

reichte, und ging mithin zum 30. September in den Ruhestand. Mit ihm verläßt uns ein aufrichtiger Freund, der sein Amt nicht nur vom grünen Tisch her verwaltete, sondern die Probleme der ihm anvertrauten Freizeitgruppen auch „an der Front“ studierte.

Dafür und für seine immerwährende Hilfsbereitschaft gebührt ihm unser aufrichtiger Dank. Ein kleines Buchgeschenk, das wir ihm überreicht haben, als er durch den Kreis der Beauftragten des Hauptvorstandes verabschiedet wurde, soll ihn für immer an diese Jahre gemeinsamen Erlebens erinnern. Wir wünschen unserem alten Freund von Herzen einen langen gesunden Ruhestand und würden uns sehr freuen, wenn er unserer Organisation als Mitglied treu bliebe und gar einmal den Weg zu einer Veranstaltung fände.

Die Nachfolge hat BAmann Kurt Mäntele angetreten. Er machte uns die Freude, schon nach wenigen Wochen seiner neuen Tätigkeit unserer 12. Jahresversammlung in Neustadt/Weinstraße einen Besuch abzustatten. Und nicht nur das, er nahm an der Arbeits-

sitzung der Bezirksbeauftragten und am offiziellen Begrüßungsabend teil. Wir glauben, daß ihm dieser erste Einblick in unsere Arbeit den Eindruck vermittelt haben dürfte, daß wir es ernstmeinen mit unserem Bemühen, Ideale und Praxis miteinander zu vereinen. Das klang auch in den Worten an, die Kurt Mäntele am Begrüßungsabend sagte.

Hat er doch ein Vermächtnis übernommen von seinem Vorgänger, der ihn gebeten hat, die Internationale Sprache zu erlernen, so wie er es selbst einst tat. Diese Bitte hat uns tief berührt. Denn nur im Verstehen und Sprechen erschließt sich der tiefe Gehalt einer Sprache. So würden wir uns nicht in erster Linie deshalb über diese Tat-

sache freuen, weil dann der Sachbearbeiter für die kulturelle Betreuung unsere Sprache spräche, sondern weil zwischen ihm und uns die Internationale Sprache ihren wahren Sinn erfüllte, nämlich Menschen schlicht und einfach zu verbinden. Deshalb glauben wir an eine gute künftige Zusammenarbeit, die wir uns von Herzen wünschen. Gi

La dekdua jarkunveno de GEFA

En Neustadt/Weinstraße renkontiĝis 140 esperantistoj el 6 landoj

Denove kolektiĝis en Neustadt/Weinstraße de la 11a ĝis 13a de oktobro 1968 140 esperantistaj fervojistoj, inter ili 20 gastoj el 6 aliaj landoj por pleniĝi la dekduon de ĉiam sukcesplenaj jarkunvenoj. La bone organizitaj aranĝoj, atentitaj de la fervoja administracio kaj socialorganizo, de la sindikatoj kaj gazetaro, pasis en bona harmonio.

Estis kiel miraklo dum tutsezona pluvperiodo, tiun semajnfinan renkontiĝon favoris la aŭtuna suno, kiam sabaton alvenis la plej multaj en la romantika vinurbo. Malgraŭ la malhepajo, ke samtempe en Neustadt okazis 3 diversaj grandaj kongresoj, funkciis nia jarkunveno sen ĝeno kun alloga programo. La loĝigo iom suferanta sub aliaj samtempaj kongresoj tamen havigis liton por ĉiu.

En la kunvenejo „Saalbau“, vid-al-vide de la ĉefstacio, ampleksa ekspozicio de esperantajj inkluzive Esperanto-poŝtmarkojn atentigis pri la signifo de la Internacia Lingvo. Antaŭ speciala poŝtĝiĉeto formiĝis longa vico de interesuloj, kiuj stampigis siajn sendaĵojn. Literaturamantoj trovis en sufiĉa kvanto librojn ĉe speciala stando de la Germana Esperanto-Asocio.

Gazetara konferenco

Vendredon kiel kutime la jarkunvenon antaŭis gazetara konferenco por la lokaj ĵurnaloj kun la kompetenta gazetara komisiito de la Fervoja Direkcio Mainz. Kiel kutime evidentiĝis la valoro de konversacio en tia rondo. Eble ĝi forigis kelkajn anticipajn miskomprenojn kaj malĝustan interpretadon. „Die Rheinpfalz“ raportis sub la titolo „In Esperanto gelten alle Re-

geln ohne Ausnahme“ kaj konstatas, ke en la Internacia Lingvo estas kvanteto da gramatiko el la antikva greka lingvo laŭ aldonita gazetartikolo. „Das Pfälzer Tagblatt“ kaj „Die Rheinpfalz“ aperis po 7 foje kun Esperanto-artikoloj plus 8 publikigoj en la distrikta regiono Palatino. Do, la loĝantaro estis bone informita pri la jarkunveno kaj entute pri Esperanto.

Laborkunsido de estraro, specialaj kaj distriktaj komisiitoj

La Esperanto-movado ne prosperas nur per rutinaj metodoj. Ne sufiĉas nur gajni novajn adeptojn. Faka asocio devas dediĉi sin ankaŭ al tiucelaj taskoj. Por la ĝenerala klerigo kaj perfektigo la Centra Biblioteko estas plu kompilata. La titolisto klasifikita laŭ la grado de la perfekteco estos nove eldonata kaj publikigata en nia organo. La plej signifoplena punkto en la tagordo estis sendube la grava ŝanĝo en la estraro. Kiel sciigite per LIF oni novelektis en Varna la IFEF-estaron. Al ĝi nun apartenas la ĝisnunaj prezidanto kaj sekretario de GEFA. Pro tio la GEFA-estaro devis alformiĝi. Tio kaj la transdono de la taskoj okazis en Neustadt. Dum la jarkunveno en Uelzen oni konfesis, ke la estraro de la Germana Esperanta Fervojista Asocio, kiu ne ŝanĝiĝis dum dek jaroj, ne nur starigis, sed ankaŭ plenumis abundan programon de ideoj kaj taskoj, oni nun povas konstati, ke multaj estraranoj estas novaj funkcioj en nia organizo. La nova estraro konsistas nun el jenaj personoj:

Prezidanto: Willi Brandenburg,
Münster/Westf.,

vicprezidanto: Joachim Gießner,
Herzberg/Harz,
unua sekretario: Otto Rösemann,
Osnabrück,
dua sekretario: Elfriede Kruse,
Frankfurt/Main,
redaktoro: Wilhelm Graß, Solingen,
kasisto: Kurt Jentsch, Darmstadt,
fakterminaroj: Gernot Ritterspach,
Langen/Hessen,
ekzamenoj: d-ro Lang, Frankfurt/Main,
instruado: Daniel Jäger, Frankfurt/Main,
varbado: Werner Dickel, Lünen i. W. kaj
junularaferoj: Günther Doliwa,
Walsrode/Hannover.

Ankaŭ s-ro Rummel, la ĉiama reprezentanto de la ĉefestraro de la Fervoja Socialorganizo en Frankfurt/Main lasis sian deĵoran postenon al la pli juna fervoja ĉefinspektoro Mäntele, kiu partoprenis nian aranĝon de la unua ĝis la lasta horo kun granda intereso.

Ekskurso laŭ la Germana Vinstrato

Kiam okazis tiu laborkunsido kaj ankaŭ jam antaŭtagmeze, multaj veturis per ruĝa fervoja buso tra la palatina vinregiono kaj trans la „Wasgenwald“. La suno brilis kiam ni forlasis Neustadt, la centron de la plej granda vinproduktado en Germanujo; ĝi samtempe situas en la plej vasta germana naturprotektita tereno ĉe la pordo de l'Palatina Arbaro. Sub la devizo „Vino, arbaro kaj migrado“ ni veturis, bedaŭrinde kun konstanta tempopremo, laŭlonge de la Germana Vinstrato. Ni trapasis la famkonatajn vinurbetojn Hambach, Edenkoben, Edesheim, Maikammer, Nußdorf ĉe Landau — ĉiuj nomoj memorigis bonajn vinspecojn — vidis la bele situantan kastelon Trifels — famkonatan en la germana historia epoko — kaj vizitis la karakterizan „Burg Berwartstein“, kiu apartenas al la malofta tipo de rokaj fortikaĵoj en la distrikto Wasgau/Palatino. De sur la fortikaĵo ni ĝuis la belegan panoramon kaj rigardon al la ĉirkaŭaĵo de la proksima vilaĝo Erlenbach. Hejmenveturante tra Annweiler am Trifels, Waldrohrbach ni vidis la ruinan Madenbach kaj la ĝardenurbon Landau. Dankon al la estro de la loka fervoja omnibustrafikoficejo, kolego Boos. Alterne kun gajaj rakontoj en palatina dialekto li klarigis la vidindaĵojn ekzakte. Inter alie li rakontis tute senenvie: „Vizitu ankaŭ la alzacan vinstraton, ĝi estas ankoraŭ pli bela ol la germana“.

Festvespero en digna kadro

Kulmino de la jarkunvena programo estis la festa kaj distra vespero en la kongres-ejo sabaton (12. 10.) vespere. La salonon plenigis pli ol 200 personoj. La gekantistoj Anni Wiesmann kaj Walter Lang, la pianisto Ulrich Mattke kadrumis per klasikaj kaj gajaj melodioj la oficialan parton. La komisiito por la distrikto Mainz, kolego Hans, malfermis la vesperon dankante al tiuj instancoj, kiuj ebligis tiun kunvenon.



La nova estraro

GEFA-prezidanto Gießner bonvenigis lastfoje ĉiujn, honoris la mortintojn de nia asocio, akcentis la celon de la renkontiĝo. Li salutis la ĉeestantojn, speciale la honorgastojn kaj dankis por telegramo de la kopenhaga Esperantogrupa, leteroj de s-ino Luise Herklotz MdB kaj salutkartoj de d-ro J. Kondor el Heidelberg. La parolanto ankaŭ dankis al la organizintoj por la preparoj kaj laboroj, ĉefe al la distriktkomisiito Hans. Li laŭdis la ekspozicion kaj menciis, ke entute 126 esperantistoj kaj 328 aliaj interesuloj vizitis tiun Esperantodemonstracion.



Joachim Gießner

Sekvis salutoj de:

S-ro Deinz, reprezentanto de la administracio kaj de la Sozialorganizo en la Fervoja Distrikto Mainz,

s-ro Mäntele, reprezentanto de la ĉefestraro de la Fervoja Socialorganizo en Frankfurt,

s-ro Jacobs, estro de la loka Socialorganizo BSW kaj samtempe por la fervojaj oficejoj Neustadt/Weinstraße,

s-ro Müller, estro de la stacidomo Neustadt/Weinstraße,
 s-ro Meyer, urbestro de Neustadt/Weinstraße,
 s-ro Schalmey, estrarano de la fervojista sindikato GdED,
 s-ro Trommer, reprezentanto de la fervojista sindikato GDBA,
 s-ro Pickel, sekretario de GEA,
 s-ro Kunze, reprezentanto de SAT kaj LEA,

s-ro Walder, estrarano de IFEF,
 f-ino Gössel, estrarano de la Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista,
 s-ro de Bruyne, prezidanto de la Belga Esperantista Fervojista Asocio,
 s-ro Bernier, estrarano de la Franca Fervojista Esperanto-Asocio,
 s-ro Joly, membro de la sveda Esperantista Asocio,
 s-ro Greutert, estrarano de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj kaj ĉefkomitatano de IFEF.

Pro spacomanko ne povas esti citataj la alparoloj demonstrantaj la estimon kaj bonvolon al GEFA kaj Esperanto.

Je la fino de la longa listo de la salutintoj parolis la estro de la Palatina Esperantista Rondo kaj de la Esperanto-Centro Neustadt/Weinstraße kaj urbkonsilanto Rößler kiel estro de la Sudokcidenta Esperanto-Ligo.

Poste ludis la orkestro Wernicke por danado. En la paŭzoj ni aŭdis modkantojn, tradukitajn de Joachim Gießner, kantitajn en Esperanto de nia ĉarma Marianne Braun el Laupheim.



Marianne Braun ricevis florojn

Matineo kun diapozitiv-prezento, ferma kunveno kaj vinprovo

Gernot Ritterspach montris sian kolordialekton pri la 20a IFEF-kongreso en Varna kaj sia veturado tra Bulgario. Majstraj estis la fotoj kaj brila la prezentado de nia perfektulo en ĉiuj Esperanto-medioj.

La iama distrikta komisiito Ritthaler poste vidigis ankoraŭ kolorajn scenojn el la ĵus pasinta festprocesio, kiu okaze de la vin-festivalo ĉiujare serpentumas tra la pitoreskaj stratoj de la romantika Neustadt. La regiona esperantistaro ĉiam partoprenas kun pluraj internacie kostumitaj grupoj kaj belaj veturiloj, en multhora laboro lerte ekipitaj. Trafaj sloganoj atentigas festpublikon kaj televidon pri la Internacia Lingvo.

Dankinte pro la elokventa prezento de kongresmemoroj kaj pro interesa demonstrado de loka aktiveco la nova prezidanto uzis la okazon por direkti kelkajn finajn vortojn al la kunvenintoj, kiuj eble post la sekva programero „vingustumado“ ne plu estus perceptkapablaj. Al la organizintoj de la ĉi-jara kunveno li dankis petante indulgon pro manketoj. Kiel elstaran eventon de la jarkunveno li konigis, ke la korporacia aliĝo de la fervojistaj sindikatoj GdED kaj GDBA donis al GEFA i. a. la rajton, anonci novajn membrojn por IFEF.



Willi Brandenburg

Kun simpatiesprimo direktita al la francaj delegitoj k-go Brandenburg salutis la inviton al Avignon, kie IFEF venontan jaron kongresos en historia pejzaĝo. La ĉestantoj danke al gekolegoj Schmid aplaŭdis la proponon, okazigi la 13-an GEFA-Jarkunvenon en Augsburg.

Sekvis unua prezentado en la longa vico de niaj jarkunvenoj: La vingustumado. Sub la devizo „Kun kvin markoj vi partoprenas“ ni sidis du horojn kunkune en gaja rondo por provi la palatinajn vinspecojn. 90 personoj sekvis keliston Anton malsupren en la vinkelo (nur spirite). Li klarigis karakterizajn diferencojn de ekster- kaj enlandaj vinoj kaj speciale el tiu ĉi regiono „Ober-Unter- und Mittelhaardt“. Ni trinkis specojn de Riesling, Sylvaner kaj Müller Turgau entute ok glasetojn, unu pli bona ol la alia. Sub la devizo „Kun pano kaj vino estu danke-maj“ finiĝis tiu aranĝo en bona harmonio.

Novaj estraranoj

Willi Brandenburg, Münster/Westfalen, 47 jara, fervojisto de 1951, esperantiĝis en 1948, ekzameno pri lingva kapableco 1949 dum Revelo-kongreso en Recklinghausen. Prezidanto de la GEA-grupo Münster/Westfalen de 1949 ĝis 1960 kaj de 1962 instruas E-on de 1950, komence en la Fervoja Faklernejo, de 1955 subsekciestro resp. komisiito por Esperanto en la Fervoja Distrikto Münster, organizanto de la GEFA-jarkunveno 1965, partoprenis kiel funkciulo 3 UEA-kongresojn (1952, 1959), Internacian Pedagogian seminarion 1959, kaj aliajn. Li gvidis la 5-an Geknaban Kongreson de SAT, estis delegito kaj fakdelegito UEA de 1953-62, organizis kaj gvidis plurajn Internaciajn Infanajn Kongresetojn de UK. De 1955 ĝis 1960 redaktis kaj kelktempe eldonis Bultenon Gepatran. De 1967 prezidas la fakprelegan komisionon de IFEF.

Adiaŭo kaj komenco

Tre estimataj ĉeestantoj!

Jen momento, kiu apartenas al la vivo de organizado same kiel nasko kaj morto al la homa vivo. En la programo staras: „**transdono de la estraraj taskoj**“. Supraĵe vidite tio daŭras nur momenton kaj jam estas kvazaŭ „deĵore preparita“ en laborokunsido. Tamen ĝi prezentiĝas kiel cezuro en la vivo de GEFA. Vi scias, ke la tri-kapa estraro de GEFA, nome gekolegoj Kruse, Barnickel kaj mi dum pli ol dek jaroj gvidis la asocion. Post kiam kol. Barnickel ekŝiĝis el la estraro en 1967, nun ankaŭ la resto de la tiamaj estraranoj metos siajn taskojn en aliajn manojn, almenaŭ grandparte. La kaŭzo ne estas, ke ni ne plu emus labori por nia landa asocio, sed ĉar oni donis al ni aliajn taskojn en la Internacia Federacio. „En du edziĝ-festoj oni ne povas danci“ laŭ germana proverbo. En tia momento estas kutimo, doni superrigardon pri la farita laboro, pri solvitaj problemoj, pri eventualaj sukcesoj kaj malsukcesoj. Sed kredu, ke fakte mi ne trovis tempon por kompili tian liston, kiu fariĝus longa. La ĉiujaraj jarraportoj publicitaj en „Bulteno“ donas superrigardon pri ĉio grava. Certe en konvena tempo ni povos denove aperigi „historieton“ pri nia germana asocio, kiel ni faris tion en 1961. Por hodiaŭ sufiĉe, ke mi unue esprimas mian kontentecon pri la atingita stato de nia organizaĵo. Kiam oni komparas la rimedojn estantajn je nia

Otto Rösemann, Osnabrück, 45 jara, esperantiĝis en 1953, kasisto, sekretario kaj prezidanto de la Esperanto-grupo Osnabrück, vizitis kelkajn IFEF-kaj UEA-kongresojn. Li partoprenis 1961 la studsemajnon en Hustedt. Jam kelkaj jaroj li estas fakdelegito de UEA por fervojoj kaj ĵurnalismo, konstanta kunlaboranto de germanaj gazetoj kaj skribis multe da artikoloj pri Esperanto por germanlingvaj gazetoj. Kiel instruanto li gvidis en la jaroj 1966/67 la Esperanto-junulargrupo Osnabrück.



Willi Brandenburg,
Prezidanto de GEFA



Otto Rösemann,
Sekretario de GEFA

dispono, kiam oni rigardas la manplenan da bonvolaj helpantoj, tiam oni certe povas esti kontenta. Retropensante al la jaroj 1953/54, kiam mi iom post iom transprenis la oficojn de redaktoro kaj sekretario kaj afergvidanta prezidanto ĉion kune, mi devas diri, ke estis vere tro por unu homo. Oni ne povis longe elteni tion. Rezulto estis la estraro, kiun ni formis en aŭtuno 1956. Permesu al mi, ke mi en tiu momento citas nomojn de kelkaj kunlaborintoj konataj al multaj el vi, kolegoj ne forgesitaj, (Se mi ellasos unu aŭ la alian, li bv. ne grumbli). Mi nomas la kolegojn Schuchmann, Pape, Ebeling, Simon, Hasse, d-ro Lang, Steinig, Jäger, Denk kaj Barnickel. Mi citas aliajn, kiuj ankoraŭ nuntempe disponigas siajn fortojn, gekolegojn Graß, Jentsch, Ritterspach kaj Kruse. Mi ne povas, eĉ ne rajtas preterlasi ĉi tiun minuton sen konstati, ke nia organizaĵo ne estus tia kia ĝi estas, se ne estus estintaj la kolegoj Ritterspach kaj Barnickel, kiuj dum jaroj en siaj laborfakoj modele faris pli ol siajn devojn kaj ofte savis la situacion per sia helppreteco. Kaj mi speciale akcentu, ke nia longjara sekretario, s-ino Kruse, dum ĉiuj tiuj ofte nervostreĉaj jaroj en vera senco

de la vorto estis la animo de nia asocio, kiu neniam kaj neniam plendis spite al daŭra troŝarĝo, kiu, kvankam ofte je la fino de siaj fortoj, tamen senbrue kaj memkompreneble, plejparte ne rimarkite de la membraro, plenumis siajn taskojn kaj multe pli ol tion, kiu spite al kvazaŭ tri profesioj — fervojista, dommastrina kaj sekretariina — neniam seniluziigis min, kiam ajn mi devis peti ŝian helpon. Dankon estu al vi ĉiuj. Tiuj jaroj instruis min, ke amikeco ne estas malplena vorto. Kaj tia sperto estas altvalora rekompenco por la sennombraj malagrablaĵoj, kiujn „donacas“ tia posteno.

Rigardante la alian flankon, la kunagadon de la membraro, oni sen longa pripensado devas konfesi: la ĝenerala stato ne estas kontentiga. Tro multaj ŝatas, ke ja okupas sin tiuj stultuloj en la diversaj estraroj, sed ili mem limigas sin al ĝuo de turismaj eroj en kongresoj kaj aliaj kunvenoj aŭ restas tute indiferentaj. Kvankam aliaj ligoj kaj kluboj prezentas simi-

lan aspekton, ni nepre devos plialtigi la procentaĵon de aktivuloj, kio samtempe signifas varbadon de novaj membroj. Tion mi jam akcentis dum miaj fermvortoj en Varna, ĉar simila situacio regas en ĉiuj landoj. Sekve la estonta estraro, kiu hodiaŭ vespere transprenos la gvidadon, havos antaŭ si eminentan taskon, kiun ĝi ataku per same eminenta energio.

Post ĝisfunda pripensado ni sukcesis trovi estraron, kiu certe estas la momente plej favora solvo por la asocio. Tiu solvo konservas por GEFA ĉiujn personajn kontaktojn kaj samtempe alportas freŝajn gvidfortojn, kiuj antaŭvideble donos al ĝi novajn impulsojn. Kiel lasta agado en mia ofico kiel prezidanto de GEFA mi prezentos al vi la novajn estraranojn, (sekvas la nomojn; vidu p. 2/3) kaj transdonas la oficon de la unua prezidanto de GEFA al mia longjara kolego kaj amiko Willi Brandenburg, pri kiu mi estas certa, ke li faros sian plej bonan en la estonta gvidado de nia faka organizaĵo. Gießner

Jarraporto pri la organiza jaro inter la 11a kaj 12a jarkunvenoj (oktobro 1967 — oktobro 1968)

Enkonduko

La 11 a jarkunveno okazis en oktobro 1967 en formo de laborokunsido de estraro kaj distriktkomisiitoj. Raporto pri ĝi aperis en Bulteno 6/67.

Same kiel la pasintaj jaroj ankaŭ la priraportita tempointervalo estas ombrumita de la ĉie konataj kaj ĉie samspecaj faktoj: ĝenerale vidite kaj unuverte de la moderna, plenhasta vivo, speciale vidite de la modernigado kaj aŭtomatigado de la fervojoj. Pli kaj pli la homoj „ne havas tempon“, ĉar la televida aparato firmkatenas ilin ĉiuvespere, tiel ke eĉ la posedantoj de filmteatroj akre plendas. Monganjado por multaj, multaj homoj estas la plej alta kriterio. Kritika pensado kaj la volo, labori je si mem dum la libera tempo malofitiĝas. La fervojistoj en ĉiuj landoj daŭre ricevas novajn taskojn, pli ampleksajn, pli gravajn, pli nervostreĉajn, kio ĉio necesigas pli da ripozo. Kiu tamen ekzistas nenie, ĉar . . . vidu televidon ktp. Sur la fono de tiu ĉi skizita diabla cirklo devis kaj devos vivi ankaŭ nia fervojista fakmovado, ne tro agrabla aspekto. Tamen, ĉar internacia lingvo estas kaj restos nepre premiso por estonta paca kunvivado de la homaro, ni esperantistoj havas la same nepran taskon, flegi la heredaĵon de niaj antaŭuloj kaj pli kaj pli firme konstrui ĝin. Jen rajto kaj devo donitaj al ni.

Organizaj aferoj — nova estraro
Supraĵe rerigardante la pasintan jaron, oni ŝajne ne povas konstati gravajn eventojn. Sed ĉi tiu ŝajno trompas. Kvankam sur la lasta paĝo en Bulteno n-ro 1/68 inter alie staras longe konataj nomoj de estraranoj kaj specialaj komisiitoj, intertempe la situacio aliĝis. Kiel sciigite per Bulteno kaj LIF en Varna estas elektitaj prezidanto kaj sekretariino de GEFA kiel estraranoj de IFEF. El tio rezultigas gravaj ŝanĝoj en la GEFA-estraro. Ni devis trovi solvon por senŝarĝigi la ĝisnunajn funkciulojn kaj liberigi ilin por iliaj novaj taskoj en IFEF, sed samtempe plue eluzi la spertojn kaj personajn kontaktojn, kiujn ili kreis dum longaj jaroj. Plej grava vidpunkto devis esti, ke nia asocio havos la plej fortan utilon. Bonŝance sin trovis bonvoluloj, kiuj transprenos grandan parton de la estraraj taskoj, dum samtempe limigite kunlaboros la ĝisnunaj estraranoj.

La kolegoj Brandenburg, Rösemann, Graß kaj Ritterspach formas la aŭfergvidantan estraron kaj fariĝos IFEF-komitatoj.

La taskoj de la komisiito ĉe la BSW-ĉefestraro restos en la manoj de Gießner, la administrado de la BSW-financmedoj ĉe s. — ino Kruse. La laborkomonuto (Arbeitsausschuß) konsistos el Gießner, Kruse, Brandenburg.

La membraro povos esti certa, ke per tia solvo la momente plej oportuna efiko estas atingita. Oni nur povas sincere danki al la novaj kunlaborantoj, ke ili metis sin je dispono, same kiel meritas varman dankon la ĝisnuna prezidanto kaj sekretariino por la seninterrompa laboro, kiun ili plenumis de proksime 12 jaroj en siaj gvidaj funkcioj.

Bedaŭrinde ankoraŭ ne ni povis trovi distriktkomisiiton por la vakanta posteno en München. Sed almenaŭ estas esperoj ĉi-riate.

Ankaŭ en la pasinta jaro la morto forprenis fidelajn membrojn el niaj vicjoj. Tio estis Jürgen Prieß, distrikto Wuppertal (antaŭe Hannover) kaj Anton Koßmann, Bestwig, same distrikto Wuppertal. Ili pace ripozu!

Rilatoj al la sociala organizaĵo

(Bundesbahn-Sozialwerk)
Fine de septembro 1968 emeritiĝis nia longjara amiko en BSW, s-ro C. J. Rummel, Frankfurt/M. Li havis la taskon, observi la kulturan agadon de la fervojistoj en la tuta tereno de DB kaj helpi en la evoluado de tiu kultura vivo. Jam komence de la kvindekaj jaroj li fariĝis nia membro kaj vizitis kelkajn IFEF-kongresojn. Li eklernis Esperanton kaj kelkfoje salutis en kongresoj per tiu lingvo. Jam la 4an IFEF-kongreson en Lindau li kunorganizis kaj ĉiam havis malfermitajn orelojn, kiam

ni bezonis lian helpon. Pro tio li meritas nian sinceran dankon ligitan kun la deziro, ke li travivu ankoraŭ longajn jarojn en bona sanstato.

IFEF-kongreso

En la 20a IFEF-kongreso en Varna (Bulgario) partoprenis 92 GEFA-anoj. GEFA organizis ruladon de speciala kuŝvagono inter München kaj Varna, kiu en ambaŭ direktoj estis bonege frekventita, kvazaŭ internaciaj antaŭ — kaj postkongresoj sur radioj. Krome estis aranĝita flugkaravano kun 28 personoj el diversaj landoj inter Frankfurt kaj Varna. Pri la kongreso mem vidu raportojn en Bulteno kaj LIF.

Centra biblioteko, kolektaĵo de revuoj

Kiel anoncite, la centra biblioteko nun troviĝas ĉe kolego Rösemann en Osnabrück. Estas planite enigiĝi novajn librojn en tiun stokon. Jam nun ĝi enhavas ĉiuspecajn kaj tre valorajn librojn por ĉies gusto. La afero nur havas unu mankon, oni tre malmulte eluzas la librojn. Estas dezirinde ŝanĝi tion. Oni same povas pruntepreni ĉe kolego Rösemann grandan kvanton de diverslandaj Esperanto-revuoj. Liston pri la disponeblaj libroj kaj revuoj oni trovas en Bulteno 4/1968.

Informado

Ankaŭ en la kuranta jaro la eŝo en fakaj kaj nefakaj revuaro kaj gazetaro estis kontentiga. „Sozialblatt“ publikigis dupaĝan raporton

pri la IFEF-kongreso kaj aliaj fervojaj revuoj (ekz „Die Bundesbahn“) aperigis notojn, same la sindikataj gazetoj. La dokumenta servo denove prenis la tekstojn de la kongresaj fakprelegoj en siajn kolektaĵojn. Pluraj fervojaj lernejoj, instruistoj kaj decernentoj krome la teknika atlernejo Braunschweig petis la germanlingvajn tekstojn de la fakprelegoj el Fulda.

Horaro

Post 15jara aperado de esperantlingva horarŝlosilo en la oficiala germana horarlibro la kompetenta fervoja instanco en 1968 eliminis ĝin. Tiu decido estas kaŭzigitaj per „spacomanko“. Konsole oni deklaris, ke ankaŭ la tekstoj de aliaj lingvoj (angla, franca) estas kaj estos mallongigitaj, resp. eĉ same malaperos, ankaŭ pro spacomanko. Tia evoluo estas des pli bedaŭrinda, ĉar la germana horaro estis la unua, kiu enhavis la esperantlingvajn klarigojn, kiuj malaperas ĝuste nun, kiam aliaj landoj sekvis ĉi tiun ekzemplon.

Varbado

En siaj fermvortoj la nova prezidanto de IFEF en Varna aparte substrekis, ke por IFEF urĝe necesas varbado de novaj membroj, antaŭ ĉio junaj. Tio same por GEFA estas vivoneciga tasko. Post la spertoj en nia varbkampanjo antaŭ du jaroj oni nur povas esperi, ke la membraro pli vaste partoprenos en nova varbkampanjo, ankaŭ se ne estus gajne-

blaj valoraj premioj. Ni nepre devos venki la jam tro longtempe daŭrantan stagnadon. Tamen okazis unu tre ĝojiga progreso, kiu samtempe donas bonegan ekzemplon, kiaj sukcesoj estas atingeblaj per bone pripensita kaj celtrafa agado. En 1968 nome la sindikatoj GdED kaj GDBA fariĝis kolektivaj membroj de GEFA pagante per tio konsiderindajn jarkotizojn. Sendube mono ĉiam estas bonvena. Tamen ne ĉi estas la ĉefa en tiu afero, sed la fakto, ke tiom potencaj organizaĵoj tiamaniere publike substrekas la valoron de la Internacia Lingvo kaj de niaj klopodoj. Tiel estas pozitive daŭrigitaj la antaŭaj roj komencitaj bonaj kontaktoj kaj kunlaborado inter la du diversspecaj kaj tre malsamgrandaj organizaĵoj, kiuj tamen havas tre similajn celojn, nome plibonigi la vivstaton de la homoj. Estu permesite esprimi ĉiokaze en la nomo de nia membraro kaj de la tuta esperantistaro plej sinceran dankon por tia rekono. Samtempe ĉi tiu fakto estu instigo por niaj anoj trovi aliajn elstarajn homojn al organizaĵoj, kiuj estas pretaj simile membriĝi.

Jen la lastaj vortoj de lasta jarraporto, kiun kompilis la longjara prezidanto de GEFA. Ĝi finiĝu per la deziro, ke sub gvidado de la venonta prezidanto Willi Brandenburg la germana landa asocio trovu prosperan vojon al solida estonto. J. Gießner

Centra Biblioteko

Daŭrigo de la librolisto / Fino en 1/69

- | | |
|---|--|
| 10 Aventuroj de Pioniro / Privat 1962 145 p. | 15 Esperanto — Mittler der Weltliteratur / Oeste 1952 96 p. |
| 11 Nieder mit den Sprachschranken / Bornmann 1950 18 p. | 16 Adresaro de la membroj de Hispana Esperanto-Asocio 1962 48 p. |
| 12 Esperanto, die internationale Sprache / Hölscher 24 p. | 17 Vivo de Zamenhof / Privat 1957 133 p. |
| 13 Die Weltsprache Esperanto / Wagner 1964 55 p. | 18 Memolibro pri la Zamenhof-jaro / Lapenna 1960 120 p. |
| 14 Die Welthilfssprache Esperanto / Wagner 1946 64 p. | 19 Esperanto, Sprache der Völker / Dr. Ziegler 1952 32 p. |
| | 20 Das Problem der internationalen Sprache / Baur 1953 20 p. |

Anoncoj

Hispanio

La foiro de Barcelona sendis afiŝojn kun esperanta teksto al ĉiuj kies nomoj troviĝas en la UK-kongreslibro 1968. Tiuj kiuj ne troviĝas en ĝi kaj deziras ricevi la afiŝon bonvolu skribi al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado-2428, Barcelona/Hispanujo.

Esperanto-Briefschule

Die neue Anschrift der „Briefschule GmbH“ lautet: 4 Düsseldorf 1, Postfach 2601. Auskünfte erteilt außerdem unser Mitglied D. Jäger, 6 Frankfurt/Main 50, Felix-Dahn-Straße 6.

Svislando

Por la dekdua fojo organizas Claude kaj Andrée Gacond esperantistan skiferon en Adelboden inter la 27a de decembro 1968 kaj la 5a de januaro 1969. La loĝejo estas simpla bela ĉaledo en la koro de fama skistacio en Bernaj Alpoj. La prezo por la tuta restado 130 sfr. Skribu al: Esperanto, CH 2314 La Sagne.

Das GEFA-Sekretariat verfügt noch über einige Weltkarten (mondmapoj), die zum Einzelpreis von DM 4,- telefonisch bestellt werden können.

Wuppertal

Wie in den vergangenen Jahren ist mit Hilfe des Amtsblattes und der örtlichen Presse auf die beginnenden Winterkurse hingewiesen worden. Von den sechs offerierten Esperanto-Kursen konnten drei dank genügender Anmeldungen, begonnen werden. In Düsseldorf wurde mit einem Fortgeschrittenenkursus die Arbeit aufgenommen. Neben einigen Volkshochschulen begann die örtliche Gruppe Schwelm am 11. 9. mit einem Fortsetzungskursus in der Pestalozzschule.

Aus den Gruppen

Essen

Der Esperanto-Kreis Dortmund und Umgebung trifft sich regelmäßig montags um 18 Uhr im Auslandsinstitut der Stadt. In den Monaten September/Oktober wurden die Vorträge (teilweise mit Farblichtbildern) „Deutscher Esperanto-Kongreß 1968 in München“, „Ferien in Österreich“, „SAT-Kongreß in Utrecht 1968“ sowie „Japan und Deutschland“ mit großem Interesse aufgenommen. Am 16. 12. 1968 wird das Programm von unseren Mitgliedern Schindler/Graß (BD Wuppertal) bestritten. Beide berichten über Bulgarien unter besonderer Berücksichtigung unseres IFEF-Kongresses. Am 18. 11. sprach Günter Bartz über die Jahreshauptversammlung in Neustadt/Weinstraße anhand von Farblichtbildern.

Karlsruhe

Den Bemühungen der Karlsruher Esperantisten ist es mit Unterstützung des Stadtrates Kastin gelungen, einen langgehegten Wunsch zu realisieren. Als Verbindung zweier Stadtteile wurde eine Fußgängerbrücke unter der Namensgebung „Esperantobrücke“ dem Verkehr übergeben. Der Feierstunde haben die örtlichen Esperantisten, eine Abordnung des Verbandes blinder Esperantisten und eine Delegation aus Nancy/Frankreich beigewohnt. Die Bevölkerung nahm regen Anteil. Die örtliche Presse berichtete wohlwollend über die Zielsetzung unserer internationalen Sprache. Es dürfte sich um die erste Brücke handeln, die den Namen „ESPERANTO“ erhalten hat.

Nürnberg

Anlässlich des 60jährigen Bestehens der Esperantogruppe Bamberg wurde die NOBELO-Jahresversammlung vom 19. bis 20. 10. 1968 unter Beteiligung zahlreicher Eisenbahner-Esperantisten durchgeführt. Nachdem vor einigen Wochen in Kronach ein Anfängerkursus mit fast 30 (dreißig) Teilnehmern begonnen hat, wird in diesen Tagen in Lichtenfels ein weiterer Lehrgang beginnen. Die Leitung hat der Bezirksbeauftragte Müller, Lichtenfels, übernommen. In Zusammenarbeit mit der Fotogruppe Lichtenfels wird in Kürze ein Lichtbildervortrag über den IFEF-Kongreß 1968 in Varna durchgeführt.

Saarbrücken

S-ro Otto Heinrich Winkelhaus, direktoro de la fervoja riparejo en Burbach, emeritiĝis fine de aŭgusto 1968. Pri la solena adiaŭa festo raportis la saarlanda gazetaro, radio kaj televido. La lerta esperantisto estis iama distrikta komisiito de GEFA en Saarbrücken kaj gvidis sukcesajn Esperanto-kursojn. En la fervojista kunveno dum la UK en Mainz li faris la unuan fakprelegon pri la temo „Modernigado, aŭtomatigado, raciigado“, tradukitan el germanlingva prelego de la tiama DB-prezidanto Geitmann. Ekster de la dejoro deziras multajn jarojn en bona saneco la estraro.

Die Universität des Saarlandes hat dem stud. phil. Reinhard Hauptenthal, Chefdelegierter für UEA in Deutschland, einen Lehrauftrag für Esperanto erteilt. Die ersten Sprachlehrgänge beginnen im Wintersemester 1968/69.

Wuppertal

Innerhalb weniger Wochen haben wir das Ableben von zwei Mitgliedern des Bezirks mitteilen müssen. In Hohenlimburg verstarb Jürgen Prieß (37) und in Arnsberg Anton Koßmann (57). Den Angehörigen haben wir unser Beileid schriftlich zum Ausdruck gebracht.



Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristnaskon kaj sukcesplenan Novan Jaron
Germana Esperanta Fervojista Asocio

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main).
Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen-Ohligs, Meteorstraße 13. Druck/
preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug
ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La
abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.